

Terminara Kuirejo:



Karaj gekolegoj, jam denove pasis longa tempo depost nia lasta kontakto. Iom malklaris la direkto, en kiun evoluas la taskoj de la terminologia grupo de UIC. La sistemsanĝo de la malnova TermEdit/RailLexic al TermWeb

estis okazo trakribi la tutan kolektitan datuman materialon, elŝeti datumojn sole utilajn por arkaikaj serĉomekanismoj, displuki mallongigojn kaj nove ordigi tiujn efektive esencajn kaj utilajn.

Komprenante la kapablojn de la nova datumbanko, rilate la laborstrategion la kurso iom ŝancele pasis de unuopaj korektoj preter diverstemaj bildvortaroj al fine la IRS, la „Internaciajn Fervojaj Solvoj“ - unuavice anglalingvaj kaj duavice tradukataj informfolioj eldonataj de UIC pri diversaj aspektoj de fervojaj funkcio kaj tekniko. Tiujn normecajn informfoliojn kompletigas specifaj glosaroj, por kiuj la tradukistoj ĉerpas el la terminaro, vidigante tamen ankaŭ ties enhavajn mankojn kaj neklaraĵojn.

Sekve la aktuala akcento de la terminologia grupo estas priservi la bezonojn de la IRS-glosaroj.

Mi klarigas tion iom larĝe ĉar mi prezentas la taskojn al vi ne en la kutima formo kun plurlingve ekzistantaj terminoj sed kun nur la origina (angla) termino kaj difino apud traduko kaj terminpropono en Esperanto. La aliaj lingvoj ankoraŭ mankas kaj estas prilaborataj de la kompetentaj terminologoj.

Sentu vin liberaj proponi aliajn terminojn aŭ kritiki la difinojn. Ni en la terminara sekcio estas la fervojaj fakuloj, ĉiuj kun diversaj kampoj. Mi persone ne estas fakulo por terkonstruado kaj estas danka por korekto se mi en klopodo kompreni la nocion ne estas trafinta la kernon.

Tiusence: Mi atendas viajn pledojn kaj sugestojn.

Guido Brandenburg

Internaciaj Fervojaj Solvoj




IRS 70719 trako kaj strukturo - "terkonstruaĵoj kaj traksidejaj tavoloj por fervojlinioj" – projektado kaj konstruaj principoj Ĝi provizas kompilitajn konojn de teknikaj spertuloj kaj ekzemplojn kun preciza priskribo de ties apliko, difinojn, principojn kaj ĝeneralajn regulojn por la projektado de terkonstruaĵoj tenantaj trakon kaj traksidejajn tavolojn de fervojlinioj, ĝi aktualigas la UIC-informfoliojn 719 (terkonstruaĵoj kaj traksideja konstruado por fervojlinioj) kaj 722 (metodoj por plibonigo de la trakbazo de ekzistantaj linioj) kaj ĝi konsideras la enhavon de kelkaj EN-normoj rilate al la traktataj temoj.

Termindecidoj el TeKu 157

mankanta	trakforno trivoja simetria
010450	trakforno trivoja nesimetria
148570	trakforno trivoja nesimetria duflanka
148560	trakforno trivoja nesimetria unuflanka
010530	trakfornoj interplektitaj
093900	trakokruaĵo speciala
129660	trakforksekcio relkomutila
129280	traforksekcio meza
998360	trakforksekcio froga
mankanta	nadloretpinta prilaboro
mankanta	nadloretpieda mallarĝigo
148320	profiltransira sekcio nadlorela
024860	relkomutilo duona fleksebla unuprofila
mankanta	relkomutilo duona fleksebla duprofila
mankanta	kontraŭrampilo
997440	apogplato por regmekanismo komutila
059400	breĉo frogala/kontraŭrela
148450	breĉolarĝo
148480	breĉoprofundo
mankanta	frogo unupeca
mankanta	risortbaskulo komuthelpa
017450	frogo kun moveblaj partoj
mankanta	hejtstango nadlorela
mankanta	ŝpalo regmekanisma kun regstango kaj sekurigilo agrafa
119000	trakforno altrapida

Se vi ne retrovas TeKu 157 kaj havas malfacilaĵojn kunordigi la rezultojn kun la taskoj de tiu eldono, bonvolu sendi retmesaĝon kaj vi senprokraste ricevos ĝin.



skizo rilata al nocio 12972

Taskoj el IRS 70719

12972	grajna materialo pleniganta la spacon inter la terstrukturo kaj struktura aŭ drena elemento sub la traksidejo backfill	plenigaĵo rembura
12973	dispecigita grajna materialo uzata por konstruo de la supra tavolo de balastaj trakoj ballast	balasto
12974	tavolo formita el balasto, sur kiun la trako estas metita kaj kiu diskondukas la pezon de la vagonaro en la grundon kaj drenas ballast layer	tavolo balasta
12975	trako konsistanta el trako-komponentoj, balasta tavolo kaj substrukturaĵo ballasted track	trako balastita
12976	trako konsistanta el trako-komponentoj kun alia subtena strukturo ol balasta tavolo kaj substrukturaĵo ballastless track (concrete) slab track	trako sen balasto trako sur betonslabo
12977	subbalasta tavolo miksitita el varmega bitumo kaj agregaĵpartikloj bituminous sub-ballast layer	tavolo subbalasta bitumeca
12978	subbalasta tavolo kombinita kun frostoprotekta tavolo kaj/aŭ filtrotavolo blanket	kovraĵo
12979	glata terstrukturo formita en procedo de elfosado cutting	terprofilo, tranĉprofilo
12981	subtere konstruita strukturaĵo el tero, ŝtonoj, aldonaj produktaĵoj aŭ reuzataj materialoj el terkonstruado (ekz. fosado, plenigado, surŝutado) earth-structure	terkonstruaĵo, grundkonstruaĵo
12982	terkonstrua procedo ŝanĝanta la geometrion de la grundsurfaco kreanta stabilajn kaj daŭrajn terstrukturojn earthwork	terlaboro, terkonstruado




Fig. 8 - Zones of a railway line embankment (based on EN 16907-1)

skizo el IRS 70719 pri talusaj partoj (vd. 12983-12987)

12983	libere staranta glata terstrukturaĵo formita per procedo pleniga embankment	taluso
12984	suba parto de la taluso en senpera kontakto kun la fundamenta grundo embankment base	bazo de taluso
12985	fakultativa meza parto de la taluso inter la bazo kaj la supra zono embankment core	kerno de taluso
12986	flanka parto de la taluso kiu ebligas pli krutan deklivon/eskarpon, protektas la kernon kaj preventas erodon embankment shoulder	ŝultro de taluso
12987	supra parto de la taluso kiu portas la trako-tavolojn embankment upper zone	supra zono de taluso
12988	tavolo dividanta la frostprotektan tavolon disde preparita trakbazo en kazo de grajngradeaj materialproblemoj filtering layer	tavolo filtra
12989	zono situanta sub akvo post fino de projekto flooded zone	1) tavolo subakva 2) tavolo mergita

12990	natura aŭ preparita/bonigita grundo aŭ ajna fundamenta strukturaĵo portanta taluson foundation ground	grundo fundamenta
12991	tavolo celanta eviti nedeziratan efikon de frosto al la trakbazo frost protection layer	tavolo frostprotektata
12992	tero eventuale vastiĝanta sub certaj kondiĉoj de malalta temperaturo frost-susceptible soil	tero frostosensiva
12993	stabila sintetika teksaĵo kiu stabiligas lozan teron kaj preventas erodon geotextile	teksaĵo terstabiliga
12994	preparita trakbazo formita el grajna materialo granular prepared subgrade	trakbazo grajnmateriala
12995	sub-balasta tavolo formita el grajna materialo granular sub-ballast layer	tavolo subŝotra grajnmateriala
12996	fundamenta grundo kaŭzanta stabilecproblemojn pro sia malgranda firmeco kaj granda probableco de sinkado/sidiĝo highly compressible foundation ground	1) grundo fundamenta altkunpremebla 2) grundo fundamenta altdensigebla
12997	tavolo formita el industriaj materialoj kaj uzita en lokoj kun tre alta frostindico insulation layer	tavolo izola




Fig. 1 - Embankment/ballasted track cross section

skizo el IRS 70719 pri talusaj tavoloj (vd. 12988-12991)

12998	dika materialebenaĵo kiel komponanto de la fundamento sur kiu kuŝas la trako layer	tavolo
12999	<i>vd. "trakplatformo" kaj "trakbazo"</i> <i>(difino diferenca en diversaj landoj angle nacilingvaj:</i> <i>nocio ne klara kaj ne traktenda)</i> <i>platform</i> <i>subgrade</i>	platformo, bazo subgrundo
13000	lokado de ŝarĝo antaŭ konstruo de la taluso por redukti eventualan sinkadon preload treatment	1) traktado perŝarĝa 2) traktado ŝarĝprema
13001	fakultativa tavolo sur la terstrukturaĵo stabila por porti la subbalastajn kaj balastajn tavolojn. La preparita trakbazo plenumas la postulojn de trakplanado rilate al portokapablo. prepared subgrade form layer	1) trakbazo prilaborita 2) subgrundo prilaborita 1) tavolo forma 2) tavolo formdona
13002	tutaĵo de ekzistanta terstrukturaĵo kaj tavoloj sur kiu kuŝas la balasta tavolo kaj la trako railway platform	trakplatformo
13003	malsuprenmovo de la taluso aŭ de ajna tavolo settlement	sinkado
13004	preparita trakbazo formita el termaterialo traktita per kalko aŭ aliaj hidraŭlikaj densigiloj stabilised prepared subgrade	trakbazo stabilige prilaborita
13005	porta tavolo sub la balasto sub-ballast layer	tavolo subbalasta
13006	tutaĵo de ekzistanta terstrukturaĵo kaj preparita trakbazo sub la kovraĵo subgrade earthworks platform	trakbazo platformo terkonstruaĵa

13007	parto de senbalasta trako konsistanta el la pavimo kaj la supra kaj suba interaj tavoloj supporting structure	strukturaĵo apoga
13008	tutaĵo de balasta kaj subbalasta tavoloj track bed	traksidejo
13009	kunmetita parto de trako-konstruaĵo inkluzive relojn, relfiksilojn kaj ŝpalojn aŭ iun ajn alian specon de relo-tenaj sistemoj track component	trako-komponento
13010	rezisto de la kompleta trakstrukturo kontraŭ formŝanĝo en rilato al aplikata forto track stiffness	rigideco traka
13011	terkonstruaĵo projektita laŭ kondiĉoj de tereno, klimato konservitaj fervojaj teknologioj ktp. por surmeti kaj ekspluati fervojlinion sekure kaj efikece track structure	trakstrukturaĵo
13012	suba parto de la trako-konstruaĵo, t.e. sub la trako, kiu servas kiel bazo. La subkonstruaĵo povas konsisti el la kovraĵo, la terstrukturaĵo kaj la fundamenta tero. track substructure infrastructure	traksubstrukturaĵo infrastrukturo
13013	konstruaĵo lokita sur la trakplatformo, ekz. supren komencante per la balasta tavolo track superstructure	superstrukturaĵo traka
13014	zono en kiu la grundakva nivelo daŭre aŭ regule havas ternivelon wet zone	zono malseka

Lasta noto:

La laborprocedo en la terminologia grupo de UIC estas ankoraŭ relative malkontentiga. Dum la grupanoj principe konsentas, ke la angla lingvo en multaj detaloj de praktika uzo estas malpreciza kaj maltaŭga kiel referenco pro la kvanto de sinonimoj (vd. 12999) kaj kaze variaj signifoj de sama termino, nun en la apersinsekvo de la IRS estas la unua kaj servu kiel bazo por kreado de terminoj en ĉiuj aliaj lingvoj de RailLexic.

La sekvonta kunveno de la terminologia grupo de UIC okazos la 19-an de Novembro kiel multaj aliaj internaciaj konferencoj en la reto kaj donos okazon pridiskuti kaj reguli tiun aferon. Sen

ŝanĝoj ĉiuj kunlaborantoj ne nur devas trovi taŭgajn terminojn en la lingvo pri kiu ili respondecas sed ankaŭ eltrovi la ĝustan enhavon de la nocio.

Skribante pri retkonferencoj: La tradicio de la pasintaj jaroj estis prezenti al vi, la membroj de la terminologia sekcio, kolekton de terminproponoj novaj aŭ ŝanĝendaj kaj decidi per voĉdono pri la adopto en la faklingvo. Por diskuto restis la kunvenoj dumkongresaj. La koronaviruso trakirlas ankaŭ tiun tradicion, ĝuste kiam mi konstatas, ke necesas fervojkonstrua fakscio ankaŭ en por mi nekonataj kampoj. Se vi responde al tiu ĉi Terminara Kuriero indikos ĉu via teknika ekipaĵo kaj kapablo de via retaliro toleras videokonferencon, tiam ni povos pritaksi, ĉu tia kunveno de la terminologia sekcio povas esti ebla. Utila ĝi certe estus.

Restu sanaj laŭeble

Guido Brandenburg

(Sekretario Terminara Sekcio)



Faka Komisiono de IFEF:

Gvidanto: Jan Uldal Niemann
 Adreso: Hovedvagtstræde 9E, 1
 DK-3000 Helsingør
 Telefono: +045 71 70 63 83
 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Terminara Sekcio:

Sekretario: Guido Brandenburg
 Adreso: Görlitzer Straße 17
 DE-48317 Drensteinfurt
 Telefono: +049 2508 9107
 Retadreso: guido.brandenburg@t-online.de